

A white dove is shown in flight, positioned in the upper center of the frame. It is surrounded by a bright, golden light that radiates from behind it, creating a halo effect. The background is a textured, light-colored stone wall. In the foreground, a yellow cloth is draped over the entrance of a stone tomb, which is set into the wall. The overall scene is bathed in a warm, golden light, suggesting a sunrise or a divine presence.

JESUO VIVAS!




ENHAVTABELO

ARTIKOLOJ DE PAIVA NETTO:

JESUO RELEVIĜIS. KAJ NI KUN LI.	5
Neniam timu defiojn	6
Spirita apogo	6
Nova vivo	7
LA AMIKO REVENAS	8
Tempo de Dio.....	9
La Dia Referenco	10

ARTIKOLOJ DE LA PORTALO DE LA RELIGIO DE DIO, DE LA KRISTO KAJ DE LA SANKTA SPIRITO:

JESUO VIVAS!.....	14
JESUO ESTAS LA EKUMENA KRISTO, LA DIA ŜTATESTRO	21




“Jesuo, la Ekumena Kristo, releviĝis.
Kaj ni kun Li, ĉiam, kiam ni staras
kongrue kun Lia Penso de Amo,
Justeco kaj Solidareco.”

PAIVA NETTO

ARTIKOLOJ DE PAIVA NETTO



Prezidanto-Predikanto de la Religio de Dio,
de la Kristo kaj de la Sankta Spirito.



JESUO RELEVIĜIS. KAJ NI KUN LI.



João Preda

José de Paiva
Netto estas
verkisto, ĵurnalisto,
radikronikisto,
komponisto kaj
poeto. Li estas
prezidanto-
predikanto de la
Religio de Dio, de
la Kristo kaj de la
Sankta Spirito.

Miaj fratinoj kaj miaj amikoj, miaj amikinoj kaj miaj fratoj, Sankta Semajno invitas nin pripensi la signifon de releviĝo. Ĝi enhavas rimarkindan simbolismon, eĉ se vi laŭlitere ne kredas ĝin. Ne eblas nei, ke ĝi prezentas mesaĝon pri renovigo de espero, eĉ en plej malfavoraj homaj kaj sociaj kondiĉoj. **Jesuo**, la Ekumena Kristo, releviĝis. Kaj ni kun Li, ĉiam, kiam ni staras kongrue kun Lia Penso de Amo, Justeco kaj Solidareco. Oni Lin sepultis, sed Li reaperis antaŭ ĉies vido, post tri tagoj. Ĉiu el ili respondas al unu figuro de la Sankta Triunuo, laŭ inversa ordo: Sankta Spirito, Kristo kaj la lumeksplodo, kiam Li reaperis je Dio, kiu estas la Sinjoro de Vivo, Kreanto de ĉiaj estuloj, Plejalta Arkitekto de la Universo.

JESUO RELEVIĜIS. KAJ NI KUN LI.

Nu, ĉian inspiron por feliĉa vivo oni devus serĉi, sen sektaj limigoj, en la biblia teksto, ĉe ĝia dia parto: *“La atesto de Jesuo estas la spirito de profetado”* (Apokalipso, 19:10). La profetoj estas, tra jarmiloj, gardantoj de tia heredaĵo, de la mesaĝo pri paco, ekvilibro kaj fido, kiun Dio sendas al la surteraj estuloj. Ili estas klarvidantoj, kaj se ili ne estus kuraĝaj, se ili ne alfrontus la malfacilaĵojn aŭdace, kiel ni hodiaŭ heredus la ateston de la Kristo? Kaj tiu atesto ne komenciĝas, kiel pensas iuj homoj, per la Evangelio laŭ **Mateo**. Ĝi devenas de la mosea Genezo, ĉar ĉio prepariĝis, kiel instruis **Alziro Zarur** (1914-1979), por la Unua Alveno de la Ĉiela Donanto kaj por Lia triumfa reveno.

NENIAM TIMU DEFIOJN

Kiam oni krucumis la Majstron, Liaj sekvantoj ekkriis malĝoje, eĉ timigite: *“Jesuo mortis!”*.

Tamen, Li releviĝis. Tial, ni neniam timu ion ajn,

inkluzive de la morto (sed oni neniam kaŭzu ĝin), kiu estas fatalaĵo en ĉiu enkorpora vivo. Sed ni ne forgesu, ke la Vivo estas eterna. Ni ne finiĝas ĉe la tombo aŭ ĉe vorado de rabobirdoj. Korpo estas nura vesto de Animo. Pro tio ni respondecas pri ĝia prizorgado.

SPIRITA APOGO

Kian profundan senton kaŭzas al ni la simpla rememorado pri la majesta vojo de la Kristo de Dio, kiu venis al ni por ke ni havu spiriton kaj vivon, tiamaniere, ke la promeso legata ĉe Profeto **Joel**, 2:28 kaj 29 ĉiam plenumiĝu: *“Post tio Mi elverŝos mian Spiriton sur ĉiun karnon; kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos, viaj maljunuloj havos sonĝojn, viaj junuloj havos viziojn. Eĉ sur la sklavojn kaj sur la sklavinojn Mi en tiu tempo elverŝos mian spiriton!”*.

Kaj Jesuo, en la Bona Mesaĝo laŭ **Marko**, 13:11, konfirmas: *“Kaj kiam oni forkondukos kaj transdonos vin, ne antaŭzorgu, kion vi parolos; sed kio ajn estos*



JESUO RELEVIĜIS. KAJ NI KUN LI.

donita al vi en tiu horo, tion parolu; ĉar la parolanto estas ne vi, sed la Sankta Spirito”.

En Sia Evangelio laŭ **Johano**, 11:25 kaj 26, la Kristo intruas: *“Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al Mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos, kaj ĉiu, kiu vivas kaj kredas al Mi, por ĉiam ne mortos. Ĉu vi tion kredas?”.*


Ni kaj multaj homoj tra la mondo fidele eldiras: Jes, Jesuo, ni kredas! ni kredas! ni kredas! Kaj nia tuta forto sidas sur tia nerompebla konvinkiteco, ĉar kun Vi ni lernis, laŭ la notoj de la Amata Disĉiplo, ke Vi estas la arbo, ni estas nuraj branĉoj. Sekve, ni nenion povas fari sen tiu potenco, kiu malsuprenvenas el la Ĉiela Patro sur la Filon. Kaj tiu Filo, ni scias, estas Vi, Tiu, kiu sendas al ni

Bonfarajn Anĝelojn, laŭ la revelacio de **Apostolo Paŭlo** per Epistolo al Hebreoj. 1:14: *“por servi al tiuj, kiuj estas heredontoj de la savo”.* Tiuj Anĝeloj estas niaj Spiritaj Amikoj, Benataj Animoj, protektantaj, Spiritoj de Dio, tiuj, kiuj formas ankaŭ la gloran falangon de **Francisko el Asizo**, Patrono de Legio de Bona Volo (LBV). Tiu institucio kompletigas, en ĉiu 1-a de januaro, pli unu plian jaron da fekunda vivo.

NOVA VIVO

Jen do la fakto, ke ĉiu tago estas rekomenco por tiuj, kiuj ne malŝparas tempon kaj restas ĉe Aganta Fido, kiu inspiras kaj aŭspicias Bonajn Agojn, kiujn Jesuo elstarigis kiel stimulon al vivo, ĉar Li mem asertas: *“Per via pacienco vi akiros viajn animojn”* (Evangelio laŭ **Luko**, 21:19).





LA AMIKO REVENAS

Hodiaŭ mi komentos kun Vi la revenon de Granda Amiko de la Homaro. Tio estas temo, kiu tre emocias niajn Animojn. Sendepende de la pensolinio, kiun iu el ni alprenas, unuanime en niaj koroj estas la deziro havi proksime de si iun, kiu direktas nin laŭ bonaj vojoj, donas al ni altajn ekzemplojn pri karakteroj de spirita, homa kaj socia kunvivado.

Mi konstatas, ĉe la reveno de **Jesuo**, la Ekumena Kristo, Dia Ŝtatestro, al la planedo Tero ian feliĉegon por ĉiuj komunumoj.

En miaj prelegoj per radio, televido, interreto kaj gazetaro, mi ĉiam klopodas analizi tiun Subliman Okazaĵon. En unu el tiuj tekstoj, el mia verko *Apokalipso sen timo*, ankoraŭ antaŭ ol ni eniris la nunan jarmilon, jene mi konsideris:

LA AMIKO REVENAS

TEMPO DE DIO

Jesuo resurektis je la tria tago. Vidu bone: Li resurektis! (Evangelio laŭ **Luko**, 24:1 ĝis 12):

“1 Kaj la unuan tagon de la semajno, ĉe frua tagiĝo, la virinoj venis al la tombo, alportante la aromaĵojn, kiujn ili preparis.

“2 Kaj ili trovis la ŝtonon derulita for de la tombo.


“3 Kaj enirinte, ili ne trovis la korpon de la Sinjoro Jesuo.

“4 Kaj dum ili embarasiĝis pri tio, jen apud ili staris du Anĝeloj en brilaj vestoj;

*“5 kaj dum ili timis kaj kliniĝis vizaĝaltere, tiuj demandis ilin: **Kial vi serĉas la Vivanton inter la mortintoj?***

*“6 **Li ne estas ĉi tie, sed resurektis**; memoru, kiamaniere Li parolis al vi, kiam Li estis ankoraŭ en Galileo,*

“7 dirante, ke la Filo de Dio devas esti transdonita en la manojn de pekuloj kaj esti krucumita, kaj la trian tagon resurekti.



Painting: James Tissot (1836-1902)
Title of the work: Mary Magdalene and the holy women in the tomb.

“8 Kaj ili rememoris Liajn vortojn;

“9 kaj reveninte de la tombo, ili rakontis ĉion tion al la dek unu kaj al ĉiuj ceteraj.

*“10 Kaj ili estis **Maria Magdalena**, kaj **Joana**, kaj **Maria**, la patrino de **Jakobo**; kaj la ceteraj virinoj kun ili rakontis tion al la Apostoloj.*

LA AMIKO REVENAS

“11 Kaj tiuj vortoj ŝajnis al ili kiel babilado, kaj ili ne kredis al la virinoj.

*“12 Sed **Petro** leviĝis kaj kuris al la tombo, kaj kliniĝinte, vidis la tolaĵojn solajn, kaj li foriris, mirante en si pri tio, kio okazis.”*



LA DIA REFERENCO

Jesuo, je la tria tago, revenos. Sed laŭ Lia Tempo, **ne laŭ homa kalkulo, kiu estas erarema.** Tio okazis al **Dionysius Exiguus** (470-544). Li mistrafis la kalkulojn uzitajn de **Gregorio la XIII-a** (1502-1585), en la reformo de la kalendaro, en la jaro 1582. La Kristo ne povas uzi kronologion, kiu jam dekomence estis misa, kaj kiun krome ne ĉiuj nacioj uzas.



Arkivo BV



Arkivo BV

Ni diru, kiel argumenton, ke la Tempon, koncerne analizon de aferoj profetaj, oni devus kalkuli ekde la apero de la Tero en la Universo. Se ni komencus per tia deirpunkto, tiam ni trovus la ĝustan daton por la tempo de Reveno de Jesuo, ĉar tiel ni estus kongruaj kun la Dia Planado, laŭ kiu ĉi tiu planado estis strukturita.




LA AMIKO REVENAS

Super ĉio, ni ne rajtas forgesi, ke la Kristo revenas ĉiutage al la koroj de Bona Volo, eĉ al tiuj, kiu ne laŭdas Lin eksplicite, ĉar Li estas Sankta Referenco pri Bono, al kiu ne devus ekzisti netrassalteblaj limoj. Tio estas **spirita fenomeno**, kiu okazas ĉe ni, koncerne kiun ni devas ekzerci niajn videmajn okulojn kaj aŭskultemajn orelojn, laŭ la konsilo de la Ĉiela Profesoro en la mesaĝoj al la Sep Eklezioj en

Azio, kiuj nuntempe situas en la tuta mondo kaj inkluzivas Politikon, Sciencon, Filozofion, Ekonomikon, Religion, Arton, Sporton, kaj tiel plu.


“Kiu havas orelon, tiu aŭskultu, kion la Spirito diras al la eklezioj de la Sinjoro. Al la venkanto mi donos manĝi el la Arbo de Eterna Vivo, kiu estas en la paradizo de Dio” (Skribaĵo de Jesuo al la Eklezio en Efeso, Apokalipso, 2:7).



PRI LA VERKISTO: JOSÉ DE PAIVA NETTO

estas verkisto, ĵurnalisto, radikronikisto, komponisto kaj poeto. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), efektiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI) kaj de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI-Inter). Li estas membro de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Ŝtato Rio de Janeiro, de Sindikato de Verkistoj de Rio de Janeiro, de Sindikato de Radikomunikantoj de Rio de Janeiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC). Li partoprenas ankaŭ Akademion de Beletro de Centra Brazilo. Li estas aŭtoro por internacia referenco pri konceptado kaj defendado de Ekumenaj Civitaneco kaj Spiriteco, kiuj laŭ li estas *“lulilo de plej grandanimaj valoroj, kiuj naskiĝas en la Animo, nome en la loĝejo de emocioj kaj de rezonkapablo prilumita de intuicio, medio, kiu enhavas ĉion, kio transcendas la vulgaran kampon de materio kaj devenas de la homa sublimita sentemo, kiel ekzemple Vero, Justeco, Kompatemo, Etiko, Honesteco, Grandanimeco kaj Frata Amo”*.

Legu pli: PaivaNetto.com/eo



ARTIKOLOJ DE LA PORTALO DE LA RELIGIO DE DIO, DE LA KRISTO KAJ DE LA SANKTA SPIRITO:



religiodedio.org

JESUO VIVAS!

El la Redakcio

Jesuo, antaŭ pli ol du mil jaroj, prilumas kaj konsolas ĉiujn per Siaj instruoj pri Amo, Justo kaj Solidareco. Dum Sia Unua Videbla Veni al la Tero, Li ankaŭ alportis fundamentajn kontribuojn al ĉiuj kampoj de homa scio, kaj instruis al ni, surbaze de Sia propra ekzemplo de sindediĉo al la Homaro, kiel ni gvidu niajn vivojn por atingi la tiom aspiratan Pacon.

Ĉar Jesuo estas universala, Liaj instruoj senlime altigas la kvaliton de homa vivo, sendepende de la religia kredo de iu ajn individuo. Tial Li estas la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro, kiel proklamas la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito.

Ĝia prezidanto-predikanto José de Paiva Netto asertas: ***“Jesuo estas, super ĉio, ia nobla kaj tre aktuala ideo, kiu antaŭeniras kaj meritas esti studata kaj travivata, fare de ĉiuj Animoj nesektemaj, liberiĝintaj de antaŭjuĝoj kaj tabuoj”.***

Ekzameni ĉi-sekve kelkajn tekstojn registritajn en Lia Evangelio-Apokalipso. Kaj, surbaze de la altvaloraj lecionoj de la Ĉiela Amiko kaj de la analizoj faritaj de la prezidanto-predikanto de la Religio de Universala Amo, komprenu, kial ni atendas kun granda feliĉo la promesitan Triumfan Revenon de Jesuo:



1

LA ENKARNIĜO DE LA VORTO

“En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio. Ĉio estiĝis per Li; kaj estiĝis nenio, kio estiĝis, aparte de Li: Kristo Jesuo!”

Evangelio laŭ Johano, 1:1–3.

2

LA ANTAŬDIRO DE LA NASKIĜO DE JESUO

“Kaj la Anĝelo Gabrielo diris al ŝi: Ne timu, Maria; ĉar vi trovis gracon antaŭ Dio. Kaj jen vi gravediĝos en via ventro kaj naskos filon, kaj vi nomos Lin Jesuo.”

Evangelio laŭ Luko, 1:30–31.

3

LA ANĜELOJ KAJ LA PAŜTISTOJ

“Kaj subite estis kun la Anĝelo amaso de la Ĉiela Armeo, laŭdante Dion, kaj dirante: ‘Gloro al Dio en la Supera Alto, kaj sur la Tero Paco, inter Homoj [Viroj kaj Virinoj, Gejunuloj, Infanoj kaj Spiritoj, nome Benataj Animoj] de la Bona Volo de Dio’.”

Evangelio laŭ Luko, 2:13–14.

Aŭtoro: James Tissot – La Adorado fare de la Saĝuloj



4

JESU-INFANO EN NAZARET

“Kaj la infano kreskadis kaj fortiĝis, pleniĝante de saĝeco; kaj la graco de Dio estis sur Li.”

Evangelio laŭ Luko, 2:40.

Aŭtoro: Heinrich Hofmann – Kristo en la Templo

5

LA ATESTO DE JOHANO

“Estas ankaŭ multaj aliaj faroj, kiujn Jesuo faris; kaj mi supozas, ke se ĉiu el ili estus skribita detale, la tuta mondo ne havus lokon por la skribotaj libroj.”

Evangelio laŭ Johano, 21:25.

6

JESUO TRANKVILIGAS SIAJN DISĈIPLOJN

Eĉ antaŭsciente ĉion, kion Li suferos pro la krucumo, Jesuo konsolis la disĉiplojn kaj nin ĉiujn, asertante: “Kaj se Mi iros kaj pretigos por vi lokon, Mi revenos kaj ricevos vin al Mi mem, por ke vi ankaŭ estu tie, kie Mi estas. Mi ne lasos vin orfaj, kaj jen Mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.”

Evangelio laŭ Johano, 14:3 kaj 14:18. Evangelio laŭ Mateo, 28:20.



7

LA KRUCUMO

Malgraŭ tio, la Homaro krucumis Lin. Tamen, eĉ suferante, Li donacis al ni unu plian altvaloran lecionon: “Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras.”

Evangelio laŭ Luko, 23:34.

Aŭtoro: Carl Bloch – La entombigo de la Kristo

LA KRUCO KAJ LA REĜO

“Kiam oni entronigis Lin sur la Krucon, Li fariĝis okulfrape Reĝo. Li jam estis Tio, kaj **tiam** Li tiel montriĝis **al ĉies rigardoj**, antaŭ la ankoraŭ nebulaj okuloj de la Homaro. Pro la modelo de rezistado kontraŭ morala kaj spirita Doloro, pri kiu Li estis kaj estas paradigmo, Li ekstaris kiel sekvenda ekzemplo por ni ĉiuj.”

Paiva Netto, en sia libro *Jesuo, la Doloro kaj la deveno de Lia*

Aŭtoritateco – La Povo de la Kristo en ni, p. 229.

8

LA REVIVIĜO DE JESUO. LIA APERO ANTAŬ LA VIRINOJ

Per Sia Reviviĝo, la Dia Majstro montras, ke ne ekzistas nesupereblaj defioj. “Kaj la Anĝelo responde diris al la virinoj: Ne timu; ĉar mi scias, ke vi serĉas Jesuon, la krucumitan. Li ne estas ĉi tie; ĉar Li leviĝis, kiel Li diris. Venu, vidu la lokon, kie la Sinjoro kuŝis.”

Evangelio laŭ Mateo, 28:5–6.



9

LA VIZIO PRI JESUO GLORIGITA

Kaj la Dia Reviviĝinto plu subtenas la Homaron transdonante per Anĝelo al Johano, la Evangeliisto-Profeto, la Apokalipson. Kaj tiu disĉiplo, sur la insulo Patmos, vidas la Vivantan Kriston, la veran aŭtoron de la Apokalipso kaj la Solan kapablan revelacii la Profetaĵojn de Dio al la popoloj!

Aŭtorrajtoj: Sátyro Marques – La Vizio pri la Trono de Dio

“Kaj kiam mi vidis Lin, mi falis ĉe Liaj piedoj kvazaŭ senviva. Kaj Li metis sian dekstran manon sur min, dirante: Ne timu; Mi estas la unua kaj la lasta, kaj la vivanta; kaj Mi fariĝis mortinta, kaj jen, **Mi estas vivanta por ĉiam kaj eterne**, kaj Mi havas la ŝlosilojn de la morto kaj de la infero.”

Apokalipso laŭ Johano, 1:17–18.



10

LA FINAJ ADMONOJ KAJ PROMESOJ

Konklude, Jesuo vivas kaj anoncas Sian Revenon per la Libro de Finaj Profetaĵoj: “Jen Mi rapide venos; kaj Mia rekompenco estas kun mi, por repagi al ĉiu laŭ lia faro”.

Apokalipso laŭ Johano, 22:12.

11

LA FERMO DE LA LIBRO

Per la jenaj vortoj, Johano fermas la Lastan Libron de la Sankta Biblio: “La atestanto de tio diras: Vere, mi rapide venos. Amen; **venu, Sinjoro Jesuo.**”

LA BENO

“La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo estu kun vi ĉiuj. Amen.” Apokalipso, 22:20–21.

Aŭtorrajtoj: Sátyro Marques – La beno



*Ten
alvenas
Jesuo!*

12

Ĉu tio plaĉis al vi? Kundividu ĉi tiun
gravegan novaĵon!



JESUO ESTAS LA EKUMENA KRISTO, LA DIA ŜTATESTRO

Komprenu la Luman ĉeeston de Tiu, kiu ankoraŭ vivas inter ni.

Teksto de la Akademio Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro*

Jesuo, la Sublima Reganto de planedo Tero, estas multe pli ol figuro, kiun devas respekti religia grupo. Liajn ekzemplojn pri Paco kaj Universala Solidareco oni povas travivi en ĉiaj kampoj de la homa kaj spirita scio. Koncerne tion, prelegis la Prezidanto-Predikanto de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito, José de Paiva Netto, jam en la jaro 1989: *“Ĉar Jesuo estas la Dia Liberiganto,*

* *“La Akademio Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro, konsistas el la Instituto por Studo, Esploro kaj Travivado de la Nova Ordon de Jesuo kaj el la Instituto por Studo kaj Esploro pri la Scienco de la Animo. Per produktado de la universala sciado, nome dia kaj homa, ĝi celas sensektigi la manieron kiel iuj vidas la Kriston de Dio kaj la Kristanisman, alidire, koncernas ĝin montri la influon kaj la aplikeblecon de la ekumenaj kaj eternaj instruoj de la Ĉiela Akademiano pri ĉiaj spirita-homaj scio-fakoj, prezentante Lin per maniero ampleksa, frateca kaj evidenta por la Homaro.”* Difino de Paiva Netto, okaze de la fondo de la **Akademio Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro**, la 1an de februaro 2007.

JESUO ESTAS LA EKUMENA KRISTO, LA DIA ŜTATESTRO


ipso facto, oni ne rajtas Lin sektigi, kaj ankaŭ ne Lin enkarcerigi en tiun aŭ alian religian kredon, eĉ se ĉi tiu ŝajnas plej brila kaj respektinda. Li estas eksterordinara Ĉiela Idealo pri Homamo, Amo,



Solidareco kaj Justeco por ĉiuj Homaj kaj Spiritaj Estuloj en ĉi tiu mondo”.

Kiam ni permesas, ke Lia Dia Influo okazu ĉe nia hejmo, ĉe nia laboro, ĉe la komunumo, kie ni vivas, tiam ni kapablas atingi ian pli bonan realaĵon, ian pli bonan version pri ni mem. Sufiĉas vidi Liajn Sublimajn ekzemplojn, kiuj ĝis nun reeĥiĝas tra la tuta mondo.

Senfina estas la plivastigo donita de Jesuo al la konceptoj pri Egaleco, Amo kaj pri la reciproka kunlaborado inter tiuj, kiuj suferis multenombrajn diskriminaciojn, ĉu pro korpaj, ĉu pro kulturaj, politikaj, ekonomiaj kaj sociaj malsamecoj. Pere de Li virinoj fariĝis socie respektataj kaj havigis al si respekton kaj Animon, kaj oni rekonis ilin kiel Filinojn de Dio; pere de Li infanoj ricevis konsideron kaj oni akceptis ilin en familian sinon; kaj multajn aliajn homojn oni ekkonsideris



JESUO ESTAS LA EKUMENA KRISTO, LA DIA ŜTATESTRO

samnivele, inkluzive de malsanuloj. Pro Lia ekzemplo pri batalado favore al tiuj, kiuj suferas korpajn malsanojn, oni dum la sekvintaj jarcentoj kreis la unuajn hospitalojn, la unuajn lokojn,



Painting: Carl Bloch (1834-1890)
Title of the work: Healing of the Blind Man.

kie malsanoj ne estis kaŭzo de kondamno kaj antaŭjuĝo.

En sia Evangelio, la Dia Amiko alvokas, ke ni komprenu Lin laŭ Liaj agoj de Bona Volo: *“Se Mi ne faras la farojn de Mia Patro, ne kredu al Mi. Sed se Mi faras ilin, kvankam vi ne kredas al Mi, kredu la farojn, por ke vi sciu kaj komprenu, ke la Patro estas en Mi, kaj Mi en la Patro”* (Johano, 10: 37 kaj 38). Jesuo instruis al ni, ke ni agu per Amo, ne atendente ion ajn interŝanĝe; Li vokis nin je nia plej granda bono, pro la Bono al niaj similuloj, kaj pro ĉio tio, la Kristo inaŭguris sur la Tero Ekumenismon, kiun oni devas kompreni, kiel ĉiam memorigas al ni verkisto Paiva Netto, *“laŭ ĝia origina senco: oikoumenikós — kiu signifas ‘kun amplekso aŭ aplikebleco tutmonda; universala’”*.

Kiam iu homo estas ekumena, tiam li estas tiel memfida, ke li ne vidas bezonon imponi super alia




JESUO ESTAS LA EKUMENA KRISTO, LA DIA ŜTATESTRO

homo. Li sentas sin kompleta, ĉar li estas utila; li trovas sencon en la vivo, kiam li servas por la komuna Bono; li estas sufiĉe simplanima por ne voli sola ekzisti, por eviti insistadon pri soleca kompreno pri ia ajn scio. Tio estas la kuraĝo de granduloj, kiuj lernas eĉ pere de siaj plej furiozaj oponentoj... Tio estas havi spiriton de justeco pli granda ol la malvirto pri vanteco kaj soifon lernadi kiel prioritaton, anstantaŭ venki. Tio estas pensi per grandiginta Animo, ligita al Dio je Amo al Liaj Kreitoj. Tio estas deziri Pacon al ĉiuj homoj, pli ol venkon de individuoj. Tiel oni devas travivi Ekumenismon. Kaj precize pro tio, ke Li travivis ĉion tion, montrante al ni, ke tio estas ebla, ke tio ne estas fora, neatingebla revo, Jesuo estas ja la Ekumena Kristo.

Lian karakteron de Dia Ŝtatestro oni povas priskribi trans perspektivo historia aŭ formalpolitika de tiu epoko. Paiva Netto asertas: **“Jesuo estas, super**



Painting: Carl Bloch (1834-1890)
Title of the work: Christ the Consolator.




JESUO ESTAS LA EKUMENA KRISTO, LA DIA ŜTATESTRO

ĉio, ia nobla kaj tre aktuala ideo, kiu antaŭeniras kaj meritas esti studata kaj travivata, fare de ĉiuj Animoj nesehtemaj, liberiĝintaj de antaŭjuĝoj kaj tabuoj, do emaj studi kaj lerni, per malfermitaj menso kaj koro, sen stimulo al antaŭjuĝemaj opinioj.”

Jesuo kondukis homamasojn por travivado de Paco; Li estis justa en siaj agoj; Li instruis, ke ni plenumu la Leĝojn kaj krome revelaciis al ni Universalajn Leĝojn, kiuj regas la Universon; Li plifortigis familiojn, nome la nukleon de la socio; al la mondopotenculoj Li prezentis la Potencon de la grandanimeco de Dio; Li revelaciis al ni, ke aŭtonomecon kaj liberecon oni konkeras unue en ni mem, kaj ke ofte troviĝas mankatenoj, kiujn ni mem alkroĉas al niaj destinoj. La Kristo instruis al ni, ke neniu povas esti feliĉa,

se li havas apud si suferanton. Tial Li regas, ĉar Li kapabligis nin atingi sendependecon ĉe niaj decidoj. Eĉ se ni ne perceptas Lian Ĉielan influon, tamen Li nin kondukas, laŭgrade kiel ni tion permesas, al konstruado de iu pli justa, frata kaj vere digna mondo.

Lia Sublima Ĉeesto akompanas nin ekde la fondiĝo de ĉi tiu Homaro, fare de Li mem, laŭ tio, kiel tekstas la raporto de Johano, 1:1 ĝis 3: *“En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio. Ĉio estiĝis per Li; kaj estiĝis nenio, kio estiĝis, aparte de Li: Kristo Jesuo!”*. Ni neniam estis forlasitaj. Pro tio ni asertas, ke Jesuo estas la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro, ĉar kiam Li faras nin sinjoroj de ni mem, tiam Li regas ĉi tiun planedon kaj kondukas nin al feliĉo.



JESUO VIVAS!



religiodedio.org

**RELIGIO DE DIO, DE LA KRISTO
KAJ DE LA SANKTA SPIRITO**